

ELDONANTOJ:
D-ro L. Zamenhof, Warszawa
(Varsovio).
W. M. Page, adv., Edinburgh.
E. Archdeacon, Paris.
Joan Gili Norta, Barcelona.
Teo Jung, Köln (Kolono).
G. van Heek, Hengelo.
Frans Schoofs, Antwerpen.
P. v. Medem, bankdirektoro,
Kaunas (Kovno).
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.
Kun-redaktoro: M. Bullin.
Literatura redaktoro: Zanoni.

ESPERANTO

TRIUMFONTO

ADMINISTREJO:
Köln-Horrem, Rejnlando,
Germanio.
Germ. poŝtĉeka konto 70863,
por Teo Jung, Köln-Horrem.
Manuskriptojn oni skribu nur
sur unu flanko de l' papero.
Skribu ĉion legeble, se eble
per maŝino. Por resendo aŭ
respondo aldonu resp-kup.
aŭ poŝtmk. Adresu ĉion al
n-o Teo Jung, Köln-Horrem,
Germanio.

ABONEJOJ

ekzistas en multaj landoj. Vidu la liston de la Abonejoj sur la
anona paĝo. — En multaj lokoj ET estas poŝtkomerciere aĉetebla
ĉe stacidomoj kaj aliaj publikaj gazetoj kaj libro-vendejoj kaj en
grupoj. Dum vojaĝo oni postulu ET en ĉiu stacidoma gazet-
vendejo, hotelo, kafejo kaj restoracio.
Komerca ĉambroj favoraj al Esperanto abonas ET senpage ĉe
la administrejo per oficiala letero. — Bibliotekoj, legeloj, redakcioj,
aŭtoritatoj (ne-esperantistaj), povas ricevi ET pro propagandaj
celoj por la duono de la abonprezo.

JARABONO:

5 dolaroj, 6 guldenoj, 10 svedaj kronoj, 12 avisaj frankoj, 12 ŝilingoj, 12 danaŭ aŭ norvegaŭ kronoj,
12 pesetoj, 20 francaŭ aŭ belgaŭ frankoj, 30 litroj, 60 flinaŭ markoj, 70 ĉsl. kronoj, 250 hung. kronoj,
600 aŭstr. kronoj, 1600 pol. markoj. — Ĉiu pagas en la valuto de sia propra lando per naciaj
bankbiletoj en rekomendita letero, aŭ per germanaŭ bankbiletoj aŭ ĉekoj sur germanaŭ bankoj
laŭ la taga kurzo. — Balkanaŭ kaj baliaŭ ŝtatoj pagu 70 germ. mk., Rusio 12 000 rubl. Aliaŭ
landoj pagu per dolaroj aŭ ŝilingoj, kiuj estas aĉeteblaj ĉe ĉiu banko kaj monŝanĝejo. — Ne estas
necese pagi tutaŭ jarabonon je unu fojo. Oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da
numeroj, por kiom valoras la pago. Abonantoj, kies abono estas finiĝonta, ricevas ĝustatempe
admonilon. — Abonoj povas esti komencataj per la aln numero — Germanoj abonu ĉe la poŝto
(Postzeitungsliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft 3. und 280, sub „Kunstsprachen“), kvadrantaŭ
15 mk., aŭ rekte ĉe la administrejo Köln-Horrem, Germanio (ĉiu numero banderolita 1,50 mk.).

ANONCOJ

kostas po cm² (kvadracentojmetro) por ĉiuj landoj 2 gmk., ĉe
grandaŭ aŭ ripetataŭ anoncoj granda rabato. — ANONCOJ
kostas po 2 folia enpresoj kaj po 25 vortoj por bonvalutaj landoj
(ankaŭ Italio kaj Finnlando) la prezon de 4 n-oj de ET (1/4 jar-
abono aŭ 4 stampitaj respondo-kuponoj); por malbonvalutaj
landoj la prezon de 6 n-oj de ET (1/2 jarabono); 1 folia enpresoj
kostas la samon kiel 2 folia; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la
pagon por anoncoj de la abonkonto — Familiaŭ anoncoj
(naskiĝo, fianĉiĝo, ktp.) kaj anoncoj pri gravaj okazintoj
(ĉefkunsido, fondiĝfesto ktp.) estas unufoje enpresataj senpage.

Numero 61 :-: Edinburgh, Paris, Barcelona, Köln, Hengelo, Antwerpen, Warszawa, Kaunas :-: 4. Dez. 1921.

Esperanto progresas en Rumanio.


Granda propaganda ekspozicio en Cluj (Kolozsvár) sub la protekto de l' transilvania eminentularo. .
Eminentuloj lernas Esperanton.

Dezajnitaŭ por esperantaŭ propagandan eks-
pozicion aranĝita la Cluj'a gesamdeanaro (25. sept.
ĝis 6. nov. nuniera). Dank' al la valorega helpo
de al ni favoranta estraro, ni ricevis la ekspozicio-
ejon en la plej taŭga centra loko de l' urbo. Ĉu
per la ekspozicio ni sukcesitis aŭ -egis vekti la
ĝeneralan intereson, tion ne ni prijuĝu; sed ni
transdonu la voĉon al la plej gravaj gazetoj de
la lando kaj ni aŭdu la opinion de l' rumana kaj
hungara gazetaro:

„Okaze, ke ĉe la Ligo de Nacioj dektri ŝtatoj
faris poresperantaŭ proponon, inter ili kiel la unua
la reprezentanto de l' Granda Rumanio, la loka
esp. grupo aranĝas ekspozicion en la Armetia
Muzeo. En la numero de l' protektaŭtoj ni povas
legi la nomojn de l' tutlanda eminentularo, kaj
ni laŭdas la estraron favorantaŭ al la grandsig-
nifa esp. movado. La protektaŭtoj de la esp.
ekspozicio kaj de sekvonta kurso estas: d-ro
Mihail, ministro; d-ro Prie, ŝtatestretario de l'
publika instruado; C. Tanasescu, ŝtatestretario de
internaj aferoj; D. Calugareanu, univ. rektoro;
prof. Cloricea, E. Isaac, ĉefinsp.; s-o C. Goodwin,
angla konsulo; d-ro Renet, ĉeĥoslovaka ataŝeo;
d-ro Ilie, poŝtdirektoro; d-ro Metes, prefekto; d-ro
Pop, urbestro; s-o Agariĉeanu kaj d-ro Paal,
prezidantoj de l' ĵurnalistaj sindikato; s-o Heveŝi,
prezidanto de l' komerca ĉambro; d-ro Pap kaj
d-ro Farkaŝ.“ (El „Gazeta Ardealului“ = „Gazeto
Transilvania“, 25. 10. 1921.)

„Hierau je la 11 h. okazis la oficiala malfermo
de la esp. ekspozicio. La malfermon ĉestis la
eminentularo de l' rumanlanda estraro. S-o V.
Morariu, ŝt. poŝtinspektoro, je la nomo de la loka
grupo salutis la ĉestantojn. S-o ministro d-ro
Mihail en sia respondo diris, ke Rumanio havas
tre grandan intereson, ke ni laboru en bona kom-
preno kun aliaŭ nacioj, kaj li volonte promesas
apogi nian porpacan laboron. S-o pastro A. Ĉe
parolis pri la tri plej gravaj okazintoj de la
kultura evoluo en la historio de l' homaro: pri
la eltrovoj de l' skribo, preso kaj ekeŝtigo de l'

mondlingvo. Poste la klubsekretario T. Morariu
faris per- kaj pri-esperantaŭ paroladon. Inter la
publiko, krom la kora ruman- kaj hungarlingva kon-
versacio, eksonis ankaŭ la molflua esp. parolado.
la nekutima intimoce, amikeco kaj varmeko regis
inter la publiko.“ (Laŭ „Keleti Újság“ = „Orienta
Gazeto“, 25. 10. 1921.)



Rigardo en la Ekspoziciejojn (Armetia Muzeo).

Oni speciale atentu la grandan mondkarton (8:3 m) kaj la tabulon kun la esp. reklamiloj de la
diverslandaj folioj (maldekstre).

„Aro da esp. gazetoj, revuoj, libroj, leteroj kaj
poŝtkartoŝ estas elmetitaj en la ekspoziciejo por
pruvi la uzeblecon kaj la disvastigon de la mond-
helplingvo. Interesege estas la esp. kolektaŭ de l'
eslantaŭ rusaj militkaptitoj, la esp. gazeto de l'
blinduloj, la grandega esp. tradukaŭaro de klasikaŭ
verkoj kaj komercaŭoj. La elmontrita materialo
estas aranĝita laŭ tre zorga kaj bongusta maniero.“
(El gazeto „Ellenzek“ = „Opozicio“, 25. 10. 1921.)

soroj, longharaj junuloj, apostolvizaĝuloj. Unu
venas post la alia. Ĉi tiun homojn eĉ sur
la strato oni povas nur malofte vidi. Longdaŭra
spirado, mallaŭta konversacio karakterizas ilin.
Sinaŝas, ke ĉi tiuj ĝejnuloj vivadas iun pli alt-
gradan vivon, ili transsaltas la limojn, la amantoj
de l' malproksimecoj, kiuj ĉirkaŭprenas la tutan
mondon, — ili estas esperantistoj...“ (Iom
stranga priskribo. — Red.)

La sama gazeto: „... Plej interesa estas la
grandioza mondkarto (8:3 metroj) kun surflitaŭ
verdaŭ flagetoj. La esperantistoj kun ĝoibla
mieno enrigardas la brunan pentraŭon de la tero
kaj la bluaŭ de la maroj; ili povas jam iri ĉi-
loken, ili komprenas unu la alian sur la tuta ter-
globo. Sur la mondkarto eĉ ne videblas malhele
desegnitaj limoj, la diversaj nacioj ne estas pentaŭ-
ritaj per malsamaŭ koloroj; nur unu nedividebla
koloro estas videbla, unu lingvego, kiu superregas
la tutmondon. La vizitantoj multe staradas antaŭ
ĉi tiu karto, kaj ili rigardas ĝin per kredo, kiel
oni rigardas en sinceraŭ, parolemaŭj okulojn, en
kiujn rigardante la animo ekripozas.“ —

Ni kredas, ke sufiĉas, se ni ankoraŭ aldonas,
ke al la esp. kurso, kiu komencis post la fermo
de l' ekspozicio, sin enskribis pli ol cent personoj,
inter aliaŭ la prefekto, la direktoro de la poŝto,
la ĉefinspektoro de l' artoj, la ĉefa konsulo, la
ĉefredaktoroj de la plej gravaj gazetoj, ktp.

Pine ni korege dankas al la kreinto de la grand-
ega mondkarto, s-o artisto Andreo Peter, kaj al
ĉiu samideano el Targui, Arad kaj Timiŝoara, al
ĉiuj sennomaj pioniroj de nia afero, ankaŭ al
la loka ĝeblond- kaj -brunularo pro la sindonema,
veresperanta kunhelpado.

Cluj (Rumanio), la 25-an de novembro 1921.
Tiberiu Morariu.

Lernejo.

Instruistoj al Ĝenevo dum Pasko.

Tre grava por nia afero estos la Internacia
Konferenco por Instruado de Esperanto en Lerne-
joj kunvokita de la instruistoj Jean-Jacques Rousseau
en Ĝenevo, okazonta je Pasko en la proksima
jaro.

Pro la fakto, ke la disvastigado de Esperanto
inter la lernejoj de la mondo estas nun esplorata
kaj studata ĉe la Ligo de Nacioj, estas nepre

suniaro da tagoj, oni rezultigas strangan mezur-
unuon, kiu estas aplikita kiel fundamenta mezuro
en ĉiuj partoj de la piramido: la t. n. „piramida
metro“ (2,5425 m). Tiu ĉi mezur-unuo korespondas
precize al la dudek-miliona parto de l' terglobo
akso. Ĉu efektive la egiptaj pastroj jam sciis
la precizan longecon de la terglobo akso, ne kon-
ante la supraŭon nek eĉ la formon de la tero?
Jen la plej granda enigmo, kiun donas al ni por
solvi la plej miriga konstruaŭo de ĉiuj tempoj!

Neĝas . . .

(En siberia kapiteco.)

Neĝas malrapide.
Dormanta la mondo
Per blanka vual' sin kaŝas en silent',
Kiel nigra ĉerko sub blanka florondo
La urbo a-pektas sub neĝo-legmen!
El punto la lukon vintro sur ĝin kovras.
— Nur sola ploranto:
Ĝ-mas akra vent';
Profunde en tombon la nokto ĝin ombras,
Neĝo enterigas
Dum festa silent'.

Famo eĉ ne venas
Pri vi, mia kara;
Nur iom vivetas la dolĉa memor'.
Pa-inta felico.
Kiel song' malklara,
Fole revivigas en animdolor'.
Frosta, kruda ŝelo koron ĉirkaŭvolvas,
Dum tag' sekvas tagon
Kun severa leg'.
Kredon kaj esperon, sopiron kaj amon
Malrapide enterigas neĝ' . . . Kapa.

Lingvaj Notoj.

De Walter Lippmann.

(Ni jen daŭrigas publikigi la tre interesajn kaj
meditigaŭ „Lingvaj Notoj“ de nia lingvosperia
kunlaboranto L., kvankam la manuskripto parte
jam iom malnoviĝis. La „Lingvaj Notoj“ 1—4
aperis en ET n-o 16, 5—8 en n-o 17 kaj 9 en
n-o 31. — Red.)

10.

Returnen — renkonten.

Tre ofte, eĉ en la verkoj de tre bonaj aŭtoroj,
oni povas legi la vortojn „returnen“ kaj „ren-
konten“. Ankaŭ en nia ET mi flakaptis tian ek-
zemplon: „Ni faras bone direkti niajn rigardojn
returnen“. (N-o 13, pĝ. 1, kol. 1.) Ĉi tiu „returnen“
memorigas al la antaŭparolo de d-ro Zamen-
hof al la 5-a eldono de la Fundamenta Krestoma-
tio. Tie li diras — en la jaro 1907 (1): „Car...
tial ne estas mirinde, ke en la libro troviĝas
kelkaj vortoj aŭ esprimoj, kiuj ne en ĉiuj lokoj
sonas absolute egale (ekzemple: ... iri returnen
kaj returne ktp.) Car ne venis ankoraŭ la tempo
por diri la lastan vorton pri tiuj dubaj formoj,
ilal mi preferis ne tui tiujn duoblajn formojn, sed
rigardi ambaŭ formojn kiel egale bonajn kaj uz-
ebiajn laŭ la libera elekto de la uzantoj.“

Do: „returnen“ estas permesita. Tamen, se ni
per la rimedoj de logiko kaj lingvosento esploras
la demandon, kiu de la du formoj estas la ĝusta,
ni devos voĉdoni por „returne“.

Jen la kaŭzoj: Ĉiuj esperantaŭ adverboj, kiuj
povas ricevi la finaŭon „-n“, montras lokon; ek-
zemple: „ie, tie supre, transe, ekstere, oriente,
sude, ĉiele, flanke“. Kun „-n“ ili montras la direk-
ton al tiu loko; ekzemple: „ien“ = al ie,
„supren“ = al supre, „suden“ = al la sudo,

„ĉielen“ = al la ĉielo. El tio oni povas dedukti
la senesceptan regulon: „Adverbo povas ricevi
la direktan finaŭon „-n“ nur, se ĝi mem montras
lokon, al kiu la movo povas direktiĝi.“

Sed — kion montras la adverbo „returne“?
Certe ne lokon! Se mi iras „returne“, tio signi-
ficas nek la lokon, nek la direkton de mia iro,
sed ĝian manieron: ĝis nun mi iris rekte (ne:
rekte!!), nun mi returnas min kaj post (sin)-
returno mi iras plu, sed nun mi iras „returne“.
Do „returne“ signifas: „(sin)returninte, post (sin)-
returno, aŭ returnite aŭ returnitaŭ fronte“, sed
neniam „return-loke“! Do el ĉi tiu adverbo oni
ne povas fari adverbos direktan per almeto de
„-n“, ĉar ĝi ne montras lokon.

Kompreneble estas tute korekte diri: „Iri reen,
direkti la rigardojn reen“, ĉar ree povas montri
lokon, nome tiun lokon, kiu estas aŭ estis post
oni kaj de kiu oni foriris. (Ekzemplo: Li restas
ree, do ni devas iri reen por helpi lin.) — Ankaŭ
la formo „reen-turne“ kiel mallongigaŭo an-
stataŭ „post kiam mi (vi, li ktp.) turnis min
(vin, nin, sin) reen“ estas korekta, sed pro
la dusenceco de la kunmetaŭoj kun „reen-“ (re-en-)
ne rekomendinda.

Kion ni konstatas rilate al „returne(n)“, validas
ankaŭ rilate al „renkonte(n)“. Ankaŭ „renkonte“
ne montras lokon, sed manieron. Ĝi estas ansta-
taŭaŭo por „renkontonte“, al renkonto aŭ por ren-
konti“. Per intermeto de la lokon signifanta
sufikso „-ej-“ oni ja povus savi la finaŭon „-en“,
sed la vorto „renkontejen“ estas neniel preferinda
al la simpla kaj sufiĉanta „renkonte“.

Ke d-ro Zamenhof nepre preferis la formojn
„returne, renkonte“, estas pruve per tio, ke 1-e
li mem ĉiam uzis nur ilin, kaj 2-e li esprime
aprobis (en letero) samopinian konsilon de
Richard Sharpe, kiun ĉi tiu donis en siaŭ „Tra-

vivaŭoj de Ro. So.“ (Komparu ankaŭ „Dr. Zamen-
hofs Sprachliche Gutachten“ Nr. 68.)

Do hodiaŭ — 14 jarojn post la eldono sendecda
de nia Malsiro — ni povas certe rigardi la tempon
kiel venintan, „por diri la lastan vorton pri tiuj
formoj duoblaj“, sed nun ne plu dubaj.

Diversaŭoj.

La plej miriga konstruaŭo.

La sola restinta el la sep „mondmirakloj“ de
la antikva epoko, la piramido de Ĥeops apud
Kairo (Egipta l.) estas ankoraŭ hodiaŭ unu el la
plej altaj (146 m) kaj p-ei gigantaŭ ŝtonaŭ konstru-
aŭoj. Efektive ĝi estas miraklo. Ne sole ĝi
diferencas de aliaŭ piramidoj per tio, ke ĝi ne
estas la maŭzoleo de iu reĝo, — ĝi estas ankaŭ
vera ŝtona enciklopedio pri la matematika kaj
astronomia scienco de la antikvaj egiptaj pastroj.
La supozata p'longiĝo de la oblikva koridoro
kondukanta en la internon de la piramido trafas
akurate tiun lokon sur la ĉielo, kie en la tempo
de la konstruo (2500 a. Kr.) estis la polus-stelo:
iu stelo en la t. n. „drako“. La lateraj randoj de
la piramido sekvas precize la ĉielajn direktojn.
La piramido post la konstruo havis altecon de
147,8 m, la lateraj randoj de la areajo longecon
de 232,16 m; do la tuta perimetro (areo ĉirkaŭo)
estis 928,64 m. La rilato de la ateco kaj de la
perimetro tute korespondas al la rilato de ĉirka
radio kaj de la periferio de tes ĉirko. Do la
egiptaj pastroj antaŭ 4000 jaroj jam sciis tute
precize la faman nombron „Pi“ (3,14159). —
Ankoraŭ pli miriga estas jena fakto: Konstruante
per radio, kiu korespondas al la alteco de la
piramido, gigantaŭ ĉirkon, kies periferio do precize
korespondas al la 928,64 m de la areo, kaj d v d-
ante tiun periferion per tiom da partoj, kiom havas

necece, ke ĉiuj instruistoj, kiuj jam havas sperton pri la instruado de Esperanto al infanoj, ĉestu la konferencon. Krom tio estas la deĵo de la esp. societoj kaj federacioj, ebligi la ĉeston de deĝitoj, kiuj bone konas la faktojn pri la disvastigado de Esperanto en sia regiono, kaj provizi finanĉajn rimedojn por sendi al la konferenco tiujn delegitojn kaj ankaŭ instruistojn.

Ĉe la konferenco la delegitoj kaj instruistoj atestas pri faktoj; ili kontribuas siajn spertojn al la komuna diskutado, kaj profitos per la spertoj de aliaj: ili ricevos la inspiron de novaj ideoj, novaj perspektivoj; kaj precipe ili helpas krei favoran „atmosferon“ por Esperanto en la urbo, en kiu okazos la Kunveno de la Ligo de Nacioj.

Dumtempe ĉiuj instruistoj kolektu faktojn kiel eble plej dokumentitajn, kaj kreu statistikojn pri sia laboro; ili tre zorge observu la efikon de la lernado de Esperanto ĉe siaj lernantoj rilate al ilia mensa evoluado, rilate al la helpo de Esperanto ĉe aliaj lingvoj klasikaj kaj modernaj, kaj rilate al la ĝenerala klereco, por ke tiuj informoj estu pretaj por la delegitoj de naciaj aŭ regionaj societoj, kiuj ĉeestos la konferencon.

Se eble, la delegitoj estu oficialigitaj de la edukistaj societoj kaj edukaj komitatoj. Tiuj societoj kaj komitatoj devos ricevi raporton pri la decidoj de la konferenco, kaj oni ankaŭ devos klopodi, ke la konferenco estu bone raportata en la profesiaj gazetoj.

La laboro de la konferenco dividiĝos en du fakojn: 1. pedagogia, kaj 2. organiza. En la pedagogia fako povas esti diskutataj rezultoj jam atingitaj, plej taŭgaj lernolibroj, plej bonaj instrumentoj, organizo de internacia korespondado inter infanoj, stipendiaj vojaĝoj, komuna kaniado, ludoj, legolibroj, la plej taŭga aĝo por instrui infanon, en kiu aspekto lernejo oni devas instrui, kaj ĉu kun aŭ antaŭ aliaj lingvoj.

En la organiza fako oni povas diskuti la plej bonan metodon klasifiki la faktojn prezentitajn al la Ligo de Nacioj kaj ankaŭ aferojn, kiuj ĝenerale tuŝas la pedagogan profesion.

Estos necese, ankaŭ organizi konferencon dum 1923, por fari la paŝojn necesajn por ektivigi la eventualajn decidojn de la Ligo de Nacioj favorajn por la instruado de Esperanto en la lernejoj.

Jen fruktopromesa programo por la konferenco, kiu certe donos al ĝi praktikan gravecon kaj seriozan karakteron. Sen tiu karaktero ĝi tute ne efikos ĉe la membroj de la Ligo. Ni ne forfuŝu la nunan favoran okazon. Ĉar alia simila ne prezentiĝos sin por multaj jaroj. Tio do insiŝte postulas, ke la esperanto-klopodo sukcesigi la konferencon per ĉiuj rimedoj en sia povo.

W.M.P.

Kiel oni fondas urban Esperanto-lernejojn?

La financa flanko de la afero.
De prof. J. Süßner, Saaz (Ĉeĥoslov.).
(Vidu ankaŭ la artikolon samtitolan en ET n-o 54.)

Se urbo prenas sur sin la garantion por la esp. lernejo, tio neniam povas esti por ĝi la risko en financa rilato. Ĉar la gvidanto de la lernejo povas ĉiam la elspezojn (umigado, hejtado, honorarioj por la instruado, aĉeto de lerniloj) aranĝi laŭ la enspezoj. Ĉe pago de 50 kĉ. po kursano oni povas egaligi ĉiujn elspezojn, ne bezonante timi, ke la urbo devos alpagi. La

La Senlingvulo.

Rakonto de Vladimir Korolenko.
Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio.
Tradukita laŭ la 5-a rusa eldono kun permeso de la aŭtoro Maria Ŝidlovskaja.
(45-a daŭrigo.)

Li prenis el ŝiaj manoj la leteron kaj zorge tradukis ĝin vorton post vorto. La enhavo de la letero tre mirigis Anna'n: en ĝi estis skribite, ke la komitato de la „Unuiĝo de geservistoj“ sciigis, ke Anna servas je tia kondiĉoj, kiuj unue estas humiligitaj por la homa indeco per sia nedifiniteco kaj due — malaltigas la ĝeneralan skalon de la salajro. Dek dolaroj monate kaj unu liberan tagon ĉiusemajne, — jen estas la minimumaj postuloj, akceptitaj en unu el la kunvenoj de la „Unuiĝo“. Tial oni refoje proponas al ŝi aliĝi al la unuiĝo kaj prezenti al sia mastro plialtitajn postulojn; alie ŝiaj samprofesistoj estos devigitaj rigardi ŝin kiel „malamikinon de la laborista klaso“.

Anna kun teruro aŭskultis tiun strangan alvokon.

„Kion oni al mi faros?“ ŝi demandis direktante al la sinjoro siajn larĝe malfermitajn okulojn kaj ne bone komprenante, kiu skribis ĉi tion kaj laŭ kiu rajto.

„Nu, similaj aferoj min ne koncernas,“ severe respondis la silentema sinjoro kaj ree enprofundigis sin en siajn paperojn. Sed inter liaj okuloj kaj la papero ŝajne staris la timigita vizaĝo de la bela knabino, konfuzita, senhelpa, tial li malkontente sin turnis, levante per kutima gesto siajn okulvitrojn sur la frunton.

Ĉu vi estas ankoraŭ ĉi tie?“ demandis li, fikse rigardante Anna'n per siaj okuloj de mlopulo, direktitaj ien en la spacon kaj vidantaj ŝajne ion post ŝia dorso.

Instruistaro de la Saaz'a esp. lernejo ricevas nun la jenajn honorariojn: la direktoro po unu instruohoro 20 kĉ., la instruisto ŝtate ekzamenita 15 kĉ., neekzamenita 10 kĉ.

Se la vizito iufoje lomete plimalgrandiĝus, la instruistaro certe havus tiom da idealismo konsenti, ke la honoraro estu proporcie malpliigata (ekz. 15, resp. 12. 8 kĉ.), konsiderante, ke tio estus nur preteririta aperjo. Do finanĉan riskon la urbo ne bezonas timi. Por malebligi senebelan malpiligon de la vizito, oni zorgu pri tio, ke la intereso je Esperanto estu ĉiam v. gla. Tion oni plej bone atingas per la edukado de kiel eble plej granda nombro da flue parolantaj esperantistoj. Por tiu ĉi celo estas nepre necese aranĝi specialajn parolvesperojn (pli bone parolig-vesperojn), nome unu vesperon por komencantoj kaj unu por progresintoj; en la lasta estu severe malpermesite dum certa tempo paroli nacilingve. Ĝenerale oni atingas la plej multon en tiu ĉi rilato per devigo. Kaj la ĝesamdeanoj baldaŭ alkitimigas, ĉar ĉiuj havas la firman intencon, kiel eble plej baldaŭ lerni paroli.

Urbo kaj urba esp. lernejo tiamaniere baldaŭ fariĝas centro de la esp. movado kaj havas sekve de tio la moralan devon, disvastigi la internacian lingvon en la ĉirkaŭaĵoj. Ni Saaz'anoj plenumas tiun ĉi taskon jenamaniere:

Supozite, estu akirota por la esp. movado la urbo N. en la ĉirkaŭaĵoj. Antaŭ ol ni povas komenci per la preparal laboroj, ni (la gvidanto de la esp. lernejo) veturas al la urbo por ebenigi la fundon, persone vizitante influicajn (kompetentajn, aŭtoritatajn) personojn, ekz la urbestron, la parukestron, la lernejestrojn, la unuiĝestrojn ktp., por ilin antaŭe informi pri la afero (olte nur la manko de informiĝo estas kaŭzo de l'mankanta intereso je Esperanto), ilin inviti por la parolado kaj peti ilian moralan subtenon. Oni certe ricevos multajn promesojn kaj certigojn, precipe se oni almontras al la faktoj en aliaj urboj. Nun oni presigas grandajn afiŝojn, per kiuj oni invitas la tutan loĝantaron al propaganda parolado kun sekvantoj paroprovoj (se eble inter anoj de diversaj nacioj). De ĉiuj vizitanto de la parolado ni postulas 1 kĉ. por egaligi la kostojn (lupago por la ĉambrego, presigo kaj pendigo de la afiŝoj ktp.). Post la parolado oni povas ankaŭ aranĝi malgrandan ekspozicion de fremdlandaj esp. gazetoj ktp. Fine oni anoncu, ke nun estos ankaŭ en N. malfermataj esp. kursoj, kaj kolektu la nomojn de la partoprenintoj.

Tiamaniere ni esperantigis jam kelkajn lokojn en la ĉirkaŭaĵoj de Saaz.

XIV-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinki-Helsingfors, Finnlando 6-12. aŭgusto 1922.

Fino de la dua komuniko.
19. Alveturo. Ĉar la kongreso ĉi tiun fojon okazos en lando, kien ĉiuj eksterlandanoj devos veni trans la maro, la LKK speciale atentis pri bona aranĝo de la alveturo de la ŝipoj. La intertraktadoj kun la Finna Vaporŝipo Kompanio ankaŭ jam kondukis al principa interkonsento, laŭ kiu ni jam nun povas doni la jenajn informojn.

Brita Imperio. Ŝipo (verŝajne „Arcurus“) eliros el Hull merkredon la 2 aŭg., tra Kopenhago (4.8.). kie ĝi restos nur kelkajn horojn, kaj alvenos Helsingforson dimanĉon la 6-an posttagmeze. Vojaĝprezoj, speciale rabatitaj por la kongresanoj, estos maksimume en 1-a klaso sterl. pund. 14-8-0, 2-a kl. 11-12-0, 3-a kl. 6-14-0 (ĉio kun manĝo).

„Strange: via vizaĝo min malhelpas. Vi demandas pri mia opinio? Aŭskultu do: laŭ mia opinio, ĉio ĉi estas malsaĝaĵo. Jam mi ankaŭ kredis je iliaj bagajeloj kaj entuziasmiĝis, ĝis mi komprenis, ke nur la scienco estas kapabla ŝanĝi ĉiujn interhomajn rilatojn. Ĉu vi komprenas? La scienco! La demando estas solvata ne sur stratoj, sed en laborĉambro de sciencisto. Jen kie“, li metis la manon sur siajn paperojn, „troviĝas la solvo de ĉiuj similaj demandoj! Baldaŭ ĉiuj ek-cinos, kaj vi ankaŭ... Sed ĝis tiam — iru kun Dio! Via vizaĝo min malhelpas. Miaj okupoj ankaŭ por vi estas pli gravaj ol tiu tuta tumulto!“

Kaj li ree sin klinis super siaj kalkuloj kaj desegnaĵoj, montrante al Anna per sia maldekstra mano, ke ŝi foriru. La knabino iris en la kuir-ejon, meditante, ke tamen ne ĉio ĉi ne similas nian landon, kaj ke ŝi nenie ankoraŭ estis vidinta tian strangan sinjoron, kiu tiel solene parolas nekompreneblajn.

Ŝi deziris ankoraŭ demandi konsilon de Dima kaj Roza. Vizitante la preĝejon, ŝi ĉiufoje preterpaŝis la loĝejon de Bork, kaj ŝi nun sciis la vojon tien. Foje, kiam la sinjorino restis hejme, kaj Anna iris en preĝejon sola, la knabino faris viziton al siaj konatuloj. Roza kaj John ne estis hejme, kaj Bork estis tie okupata. Tamen Anna ekscias de li, ke Dima forveturis al Minnesota, ĉar letero fine estis ricevita de s-ro Osip Lozinski. Tio okazis por Dima en vere ĝusta tempo, ĉar liaj kunuloj-irlandanoj disiĝis, Tammany-Hall ne bezonis plu liajn servojn, kaj laboro ĉiam ankoraŭ ne troviĝis. La portempa fameco kaj la apero de lia porireto en gazetoj malmulte konsolis Dima'n pri la perdo de la amiko. Cetere en tiu tempo la publiko jam ne sin interesis plu pri la akcidento en la Centra Parko, precipe kiam oni fine eksciis, ke s-ro Hopkins, tiue ne mortigita, resaniĝis kaj fartas ne malpli bone ol antaŭe. La historio de de la sovaĝulo transiris iom post iom sur la

Danujo. La ŝipo el Hull prenos la danajn samideanojn el Kopenhago vendredon la 4. aŭg. pim. Alveno Helsingforson la 6-an. Vojaĝprezo maksimume en 1-a klaso 160 dkr., 2-a kl. 120 dkr., 3-a kl. 72 dkr. (ĉio kun manĝo).

Germanujo. El Stettin (verŝajne „Ariadne“) eliros merkredon la 2. aŭg. alvenante Helsingforson vendredon la 4-an. Vojaĝprezoj maksimume en 1-a kl. 720 fmk., 2-a kl. 640 fmk. (ĉio kun manĝo).

Svedujo. El Stockholm ŝipoj iros trifoje semajne. Plej konvena ŝipo por la kongresanoj eliras jaŭdon la 3. aŭg., alveno Helsingforson vendredon la 4-an. Vojaĝprezoj maksimume en 1-a klaso 80 skr., 2-a kl. 64 skr., 3-a kl. (sen kajuto) 48 skr. (ĉio kun manĝo).

Estonujo. Pri la alveturo trans Tallinn ni informos poste.

Aliaj linioj. Krom tio ekzistas eblecoj, ke speciala ŝipo povu veturi el Lübeck vendredon la 4-an de aŭgusto, Helsingforson lundon la 7-an frumatene. Prezoj samaj kiel el Stettin.

Por la linio Antwerpen—Rotterdam—Helsingfors ankoraŭ ne estis eble rezervi ŝipon. La Finna Vaporŝipa Kompanio ne havas disponeblan pasaĝerŝipon, kaj la ŝarĝoŝipoj, kiuj ordinare trafikas tiun linion, ne povas preni pasaĝerojn. La LKK daŭrigos siajn penadojn. Tamen estas eble, ke ĝi ne sukcesos, kaj en tiu okazo la francoj, belgoj kaj nederlandanoj, por kiuj ĉi tiu linio estis intencita, devos aliĝi al la karavanoj tra Hull, Kopenhago aŭ Stettin (kaj eventuale Lübeck). La lastaj vojoj ĉiokaze estos la plej malkaraj.

La vojaĝprezoj ĉi tie donitaj estas specialaj rabatprezoj por la partoprenantoj de la XIV-a kongreso. Ili inkludas liton en kajuto (krom en unu notita okazo) kaj manĝon dum la tuta vojaĝo. La prezoj estas maksimumaj; ebleco ekzistas, ke ili estos ankoraŭ iom malaltigitaj.

La samideanoj, kiuj deziras uzi ĉi tiujn ŝipojn, devos pri tio informi al LKK aŭ al la karavangvidantoj en la diversaj landoj plej malfrue 6 semajnojn antaŭ la ekveturo. La LKK jam interkonsentis kun s-ro P. Blaise, 125, Hambalt Road, Clapham, London S. W. 4. pri gvidado de la brita kaj kun s-ro L. Poncet, 36, rue Victor Hugo, Lyon, pri gvidado de la franca karavano, kaj petas ĉiujn britajn kaj francajn samideanojn sin turni al ili en ĉiuj demandoj. La LKK esperas, ke ĝi baldaŭ povos sciigi nomojn de karavangvidantoj ankaŭ en aliaj landoj kaj petas personojn interesintajn fariĝi tiaj plej baldaŭ informi pri tio al la LKK.

Koncerne la forveturon el Helsingfors post la kongreso, la LKK ankaŭ povas sciigi, ke ŝipoj al Hull kaj Stettin foriros sabaton la 12 aŭg. vespere, kaj al Stockholm dimanĉon la 13-an matene, kiujn okazojn do povos uzi la samideanoj, kies libertempo ne permesas pli longan restadon en Finnlando. La ŝipoj elveturas ĉiusemajne, la nomitajn tagojn.

La Loka Kongresa Komitato.
Adreso: Poŝta (ankaŭ por mensendo): XIV Kongreso de Esperanto, Helsinki, Finnlando.
Telegrafa: Esperanto, Helsingfors.

Komerco.

La Pariza Foiro estas ĉiujara merkato de francaj fabrikaĵoj, malfermita al alilandaj komercistoj. Dum la lastaj jaroj, organizita kun la aktiva partopreno de la Pariza Komerca Ĉambro, ĝi multe pligraviĝis. En 1917 ĝi enhavis ĉirkaŭ 1750 ekspozantojn kaj

kvaran, kvinan, sesan paĝon de gazetoj, kaj sur la unua, pro manko de aliaj sensaciaj temoj, estis post kelkaj tagoj presita porireto de bela fraŭlino Lizzi kaj de sinjoro Fred, tre junaj ĝemantoj, kiuj geedziĝinte propravole en Baltimore faris al la gepatroj de la fraŭlino, bonekonataj milionuloj de Nov-Jorko, „neatenditan surprizon“. Kaj la ĝaja bukla kapeto de fraŭlino Lizzi kun ruzetaj nigraj okuloj rigardis la legantojn de sur la sama loko, eĉ desegnita per la sama kraiono, kiu antaŭ nelonge donis porireton de nia Mateo.

El tio sekvas, kiel facile estas famiĝi en tiu lando kaj kiel mallonge la fameco daŭras.

Nur Dima kaj geedzoj Lozinski legis laŭeble ĉion, kio estis presita pri Mateo kaj primeditis la rimedojn, per kiuj ili povus trovi la malleiĉan viron, dronintan sen postesigno en la homa oceano.

XXVI.

La kaŭzinto de la tuta eksciiĝo de la publiko en la tago de la fama meeting'o vespere jam veturis en rapidega vagonaro al Detroit, al Buffalo⁴¹⁾, al Niagara kaj Chicago⁴²⁾.

Kiamaniere li venis en la vagonaron, li poste ne tute bone rememoris. Kiam la homamaso faris paŭzon, kiam li komprenis, ke nenio plu okazos, nenio povas okazi krom io malbonega, kiam fine li vidis Hopkins'on, kuŝantan surtere kun mortpala vizaĝo kaj fermataj okuloj, li haltis, sovaĝe ĉirkaŭrigardis, sentante, ke en ĉi tiu urbeĝo lin fine minacas nun vera danĝero. De tiu momento li ree fariĝis senhelpa infano, kaj li senkontraŭdire sekvis iun alikreskan, maldikan italon, kiu lin kaptis je la mano kaj lin ien fortiris.


La placon ili trakuris kun la homamaso, poste ili penetris en straton, malsupreniris en iun kelon, kie sidis ankoraŭ deko da vaguloj, parte malĝajaj, parte videble kontentaj pri la hodiaŭa tago. Malĝajaj estis la maljunaj, — kontentaj la junaj senfamiliuloj, kiel ekzemple la alikreska sav-

⁴¹⁾ Buffalo. Ĉikago.

en 1921 3800. Pli ol du milionoj da personoj vizitis la lastan foiron okazintan en majo nunjara. Multaj francaj kaj eksterlandaj aĉetistoj traktis kun la francaj indu-triistoj gravajn aferojn. La komitato de la foiro ricevis vizitojn de delegitaroj venintaj el landoj Angla, Japana, Ĉeĥoslovaka, Belga, el Nederlando, Ameriko ktp. kaj de eksterlandaj ĵurnalistoj.

La venontjara foiro okazos en majo.

La komitato de la foiro estas tre favora al Esperanto. En 1921 ĝi eldonis esp. prospektojn, kelkajn milojn da propagandaj folioj, disdonitaj al vizitintoj de la foiro aŭ dissenditaj de la komitato al ĉiuj ekspozintoj. Ankaŭ kiosko estis sen-



La Enirejo al la Esp. Ekspozicio en Cluj. Atentu super la portalo de la Artmetia Muzeo la tabulon kun surskribo: Esperanto-Ekspozio.

page donita al la pariza grupo. Certe, la foiro faros samon en la proksima jaro. Komercistoj bonvolu skribi al la komitato de la Pariza Foiro, 8, Place de la Bourse, Paris, demandante en Esperanto la prospektojn kaj sciigojn.

La komerca ĉambro en Limoges (ĉefurbo de la departemento de Haute Vienne, Franc., 92000 loĝantoj, distilejoj kaj konataj porcelanfabrikejoj) en sia kunveno de 4 nov. aliĝis al la poresperanta decido de la pariza komerca ĉambro laŭ la propono de la vicprezidanto s-ro Boudet.

En la komercaj lernejoj de la dekstra kaj maldekstra bordoj de la Seinerivero en Paris prof. Carl Insruas oficiale Esperanton. Tria kurso estas organizata.

Laboristaro.

Societo „Laboro“ en Varsovio (Pol.) faras nun efikan propagandon inter polaj laboristoj, fondante kelkajn provincajn filiojn. Estas publikitaj alvokoj en multaj laboristaj gazetoj. Lastatempe konvencis tre grava gazeto malfirmi konstantan esp. rubrikon unukolonan en ĉiu numero („Swiat Pracy“ = „Mondo de l' Laboro“, organo de Laboristaj Kooperativoj). La 6. nov. okazis aranĝita de la Varsovia Regiona Komitato de Pola Partio Socialista propaganda parolado de s-ro Domoslawski. La societo gvidas nun kvin kursojn kun ĉ. 110 lernantoj, interalie du laboristajn kursojn (60 p.), la unuajn en Varsovio.

Abonu al ET!

into de Mateo. Li estis tiu sama junulo, kiu matene antaŭ la meeting'o frapetis Mateon je la ŝultro, palpante liajn muskolojn. Al la ĝaja junulo ŝajne tre plaĉis la agmaniero de Mateo pri la policon. Tiam li kaj liaj kunuloj sekvis la ekzemplon de Mateo, kiu faris al ili la vojon; sed poste, kiam la homamaso haltis, ne sciant, kion fari plue, la junulo tuj komprenis, ke nun estas nepre necese sin kaŝi, ĉar la afero prenis plej seriozan karakteron. Kaj li konsideris kiel sian devon zorgi ankaŭ pri la strangaspekta fremdulo.

El la strato oni kondukis Mateon en lun ĉambron, longan, mallarĝan, sufiĉe malluman. Ĉi tie kunvenis du dekoj da viroj de diversa nacieco, kiuj, sentante sin en plena sendanĝereco, pridiskutadis la okazintaĵon de l' tago. Ili flame interdisputadis; unuj trovis, ke vane oni rompis la meeting'on, aliaj insiŝtis, ke tute kontraŭe — ĉio bone sukcesis, kaj ke la fakto de la senpera interpuŝiĝo kun la polico ankoraŭ pli forte impresos ol la „iro modera parolado“ de Hompers. Ĉio ĉi alkondukis fine la interdisputantojn al la demando, kion fari nun kun la stranga alilandulo.

Oni komencis demandi Mateon en diversaj lingvoj, sed li nur rigardis ĉiujn per siaj bluaj okuloj, en kiuj vidigis korpemanta angoro, kaj ripetadis: „Minnesota, Dima... Lozinski...“

Fine la alikreska junulo faris la konkludon, ke restas nenio alia, ol, alivestinte la strangulon, forveturigi lin al Minnesota. Oni alportis vestojn, kiuj tuj krakis ĉe ĉiuj kunkudroj, kiam oni ilin surtiris sur Mateon, poste oni venigis raziston el siaj asocioj. Komence Mateo provis protesti, sed kiam la italo per tre elokventa gesto montris lian kolon, kvazaŭ kunpremanante ĝin per ŝnureta maŝo, Mateo komprenis kaj humile submeriĝis al sia sorto. Post dek minutoj Mateo ekvidis en malgranda spegulo fremdan nekonatan vizaĝon kun tonditaj liparoj kaj mallonga ŝovellito antaŭaŭ barbo.

(Daŭrigota.)

Mallongaj Esp. Scilgol.

Hebreaj esperantistoj.

Laŭ scilgo de „La hebrea Tribuno“, eldonata en Paris, la Unuiĝo de hebreaj Esperantistoj, ekzistanta en Ĉeĥoslovakio, decidis eldoni ĵurnalon por propagandi Esperanton inter hebreoj kaj konigi la hebrean vivon al la tutmonda esperantistaro.

En Aulnay-sous-Bois (apud Paris) kurso de s-o Couteaux kun 27 lernantoj.

Dum la 1-a Internacia Kongreso de la Aera Navigado

malfermiĝinta la 15. nov. en Paris, s-o Rollet de l'Isle, generalo-inĝeniero de la hidografia fako de l' franca marino (kiu antaŭ kelkaj monatoj ricevis la komandon krucon de la Honora Legio) prezentis raporton pri Esperanto. Ĝi ne povis esti legata, kiel multaj aliaj, pro tro vasta programo, sed estis presata en la raporto de la kongreso.

Esperanto en Karintio (Kärnten).

Esp. Unuiĝo por Karintio en Villach ebligis la enkondukon de Esperanto en la Popola Aŭstern-ejo. La unuiĝo kunvenas ĉiuvendrede je 8 h. vespere en kafejo Parkhotel. Prez. de la unuiĝo: Fritz Homer, Villach, Bismarckstr. 7a; sekr. Franz Wajinger, Widmannng. 27.

ET en Salzburg (Aŭstrio).

Salzburg ricevas ĉiusemajne 25 ekz. ET estas legebla en unu el la plej grandaj kaj belaj kafejoj (Kafejo „Korso“). La kafejulinio kontrakte devas ĝin abonati kaj elmeti en la salono.

En Madrid (Hispanio)

s-o pastro Mariano Molado gvidas esp. kursojn en la Centra Normala Lernejo, por instruistoj, kaj en la Hisp. Skolta Societo.

Esperanto en Brazilo.

„Brazilia Esperantisto“ raportas pri vekiganta esp. vivo en multaj urboj de la vasta lando. Nova grupo fondiĝis en Mossoro (Rio Grande Norte), laborista grupo ekestiĝis en Rio de Janeiro. Kursoj okazas en Mossoro (du kursoj), Juiz de Fora (Minas Geraes), S. Paulo, Pelotas (Rio Grande Sul) kaj Rio de Janeiro (unu supera kurso de s-o A. Couto Fernandes kaj unu en blindul-instituto „Benjamin Constant“). La brazilia gazetoj montriĝas tre favora kaj aperigas ofte artikolojn pri nia movado. „Brazilia Ligo Esperantista“ prenis sur sin la taskon korporaciiĝi „Eldonan Esp. Societon en Brazilo“. — La brazilia parlamento dekretis kaj la prezidanto de la respubliko, d-ro Epitacio Pessoa, sanktis jenan rezolucion: „Estas konsiderata kiel societo de publika utileco la Brazilia Ligo Esperantista“. (Dekreto n-o 4556, de 26. okt. 1921.)

El Wilno (Mesa Litovio)

oni skribas al ni:

Fondita la 1-an de novembro nunjara Internacia Esp. Klubo „Kulturo“ kun fakoj: agrikultura, filozofia, geografia, historia, humanista, legoscienca, literatura, medicina, naturscienca, pedagogia, teologia, teknika, de internacia interŝanĝo kaj korespondado, — invitas vin, ges-anoj, por komuna energia laboro. IEKK celas: a) kunigi sciamajn izolulojn kaj dezirantajn sin perfektigi diversprofesianojn; b) disvastigadi la kulturon kaj fakan sciencon per taŭgaj esp. libroj kaj ĵurnaloj; c) eldonadi universalan, ampleksan, ilustritan revuon semajnan, dediĉitan al ĉiuj branĉoj kaj problemoj de la scienco, fakaj sciigoj kaj homa vivo sur la terĝlobo. — Membroj-kunlaborantoj pagas la kotizon, kiu ne estas

deviga, laŭ sia povo kaj ofereco; membroj-protektantoj pagas minimume 1000 polajn markojn transkalkulitajn en nacia mono laŭ kurzo. Al informetoj aldonu respondilon. Bonvolu adresi: Wacław Kwieciński, Wilno, Żelazna Chaika 50.

Ekspeda kaj Trafika Centrejo „Express“ en Bydgoszcz-Bromberg (Pol.)

akceptinte Esperanton por sia eksterlanda korespondado, nun akceptis ankaŭ la publikan vendadon de ET en siaj 6 filiaj vendejoj en Bydgoszcz.

El Verviers (Belg.)

Ni ĝojas ekscii, ke nia movado en valona Belgujo pli kaj pli kreskas. De Verviers (apud Liège), ni ricevas jenajn informojn:

Artikolojn pri praktikaj esp. spertoj ni enpresigas ĉiusemajne en niaj kvar ĵurnaloj, en „Les Nouvelles“ de Dolhain-Limbourg, kaj eĉ germanlingve redaktitajn en „Die fliegende Taube“, aperanta en Aubel por la germanlingva parto de Belgujo.

Tri kursoj, gvidataj de s-oj Delhez, Hérlon kaj Dohogne, por entute 80 fervoraj ĝelernantoj, komencis en nia sidejo „La Mutuelle“, popola universitato, je l' komenco de novembro.

Nia grupo estas akiranta multajn novajn honor-membrojn; ĵus akceptis la vic-honorezidantecon s-o urbestro Lucien Defays.

Lundon 14-an kaj lundon 21-an de novembro, okazis du paroladoj en la ĉambrego de „La Mutuelle“, unue de s-o Paul Oret, direktoro de „Palais Mondial“ de Bruxelles, kaj sekretario de „Unuiĝo de la Internaciaj Asocioj“ pri ĉiuj post-militaj homaraj demandoj kaj internaciismo; due, de s-o senatano Lafontaine pri la „Ligo de Nacioj“, kies delegito li estas. Ambaŭ parolantoj menciis la necescon de Esperanto, kies variaj subtenantoj ili estas.

Mardon 18-an, en „La Semeuse“, socialista popola universitato, antaŭ 30 personoj konferencis juna s-o Bologne, filo de la socialista deputito, pri la „Demando pri la Lingvo Internacia“. La parolado devis esti tute objektiva kaj neŭtrala, por ke la komitato povu elekti unu lingvon por kurso donota de ĝi. Verdire ĝi nur estis atako kontraŭ Esperanto kaj laŭdado de ldo. Amikoj refutis kelkajn punktojn, kaj la komitato nenion decidis pri elekto.

„La Marto“

raportas en sia novembra numero pri bona progreso de nia movado en la germanlingva parto de Ĉeĥoslovakio. Novaj grupoj en Eichwald kaj Meierhöfen apud Karlsbad. Paroladoj okazis en Hohenelbe, Karlsbad, Meierhöfen, St. Joachimsthal, Tetschen-Bodenbach kaj Warnsdorf. Kursoj funkcias en Karlsbad (14 p.). Haida (perfektiĝa k.), Hohenelbe (2 kursoj, 36 p.), Karshad (po 1 kurso por komencantoj kaj progresintoj, 20 resp. 30 p.), Meierhöfen. Reichenberg (1 por komencantoj, 1 en komerca lernejo, 1 por progresintoj, Saaz (4 kursoj en la urba esp. lernejo), Tetschen-Bodenbach (por teknikistoj) kaj Warnsdorf.

Esperanto en Germanio.

La lasta n-o de „Germ. Esperantisto“ enhavas scilgojn pri multaj propagandaj paroladoj, kursoj ktp. Ni citas propagando-paroladojn en Bremen, Eisenach, Eislab'n, Esslingen, Frankfurt, Geising, Halle a. S., Lübeck, Nürnberg-Fürth, Schweidnitz, Werdau, Worms kaj Zittau; kursojn en Breslau, Dresden (9 kursoj kun 200 p.), Eisenach, Eisenach, Essen (laborista grupo aranĝis 5 kursojn por plenkreskuloj, 3 por infanoj, 3 de Popola Aŭstern-ejo, entute 350 p.), Esslingen, Frankfurt, Geising, Godesberg, Halle a. S. (3 kursoj kun 29 p.), Leobschütz (4 kursoj por komencantoj, 1

privata kurso por lernantinoj de la knabina gimnazio kaj 1 kurso ĉe la gimnazio), Mainz kaj ĉirkaŭaĵo (diversaj kursoj), München, Oels (36 p.), Weiden i. B., Wurgwitz-Niederhermsdorf (30 p.); krome kursoj ĉe Popola Aŭstern-ejo en Crimmitschau kaj ĉe Akademii Kursoj en Essen. En Braunschweig okazis esp. ekspozicio la 22-30. okt. — Pri agado de Esp. Grupo Koblenz ni ricevis specialan raporton, laŭ kiu la grupo vivo estas tre vigla. Kursoj en Koblenz: 3 ĝeneralaj, 1 por urbaj kriminal-oficistoj; en la ĉirkaŭaĵo: 1 en Niederlahnstein, 1 en Vallendar. Post konsento de la kompetentaj estroj oni pendigis esp. afiŝojn en diversaj publikaj lokoj (kafejoj, stacidomoj de l' ĉirkaŭaĵo ktp.). En la porinfana lampiona proceso je l' antaŭvespero de S-ia Martino estis portata granda bela esp. diafanaĵo. Esp. oficejo troviĝas Löhrrstr. 90.

Donaco de 20000 gmk.

ricevis Germana Esp. Asocio por sia propaganda fonda de la firmo Mimosa A. G. en Dresden. Por destini pri la utiligo de la donaco formiĝis speciala komitato el s-oj d-ro Sieche, d-ro Arnold kaj direktoro Wiener.

80-jara Esperantistino.

S-ino Anna Tuschinski, fondintino kaj honora membro de Danziga Esp. Asocio, festas hodiaŭ (4. dec.) la 80-an revenon de sia naskiĝotago. La Danziga Esp. Asocio je tiu malofita okazo aranĝas honorvesperon al la jubileulino. La redakcio de ET kunigas siajn korajn gratulojn kaj bondezirojn kun tiuj de ĉiuj geparencoj kaj ĝeamikoj de la alitŝatata pionirino de nia movado. Fartu ŝi bone kaj povu ŝi festi post dek jaroj sian 90-an naskiĝotagon sana kaj vigla!

Sporto.

Piedpilko: Hungarlando-Svedlando 4:2.

Veluludo inter la elektitaj piedpilkistoj de Svedlando kaj Hungarlando okazis la 6. nov. en Budapeŝt. Tia vetuludo okazis inter la du landoj antaŭ la mondmilito ĉiujare alterne en Stockholm kaj Budapeŝt. Tiu ĉi unua veluludo post la milito okazis inter grandaj festenoj: ĉeestis 35000 rigardantoj. La interesa ludo finiĝis, kiel ĝis nun preskaŭ ĉiam, kun venko de la hungara trupo 4:2.

Gazetaro.

„Brazilia Esperantisto“ de majo-aŭgusto nomas pli ol 20 brazilajn ĵurnalojn, kiuj aperigis artikolojn pri Esp.

Le Journal, Paris, en artikolo pri la instruado de latina lingvo citas la por-esp. decidon de la franca komerca ĉambro. L'index des Industries du Cuir et des Matières s'y rattachant, Paris, 84 rue de Bondy, nov. (Kun rubriko „Por niaj esp. legantoj“)

L'Evolution, Aulnay-sous-Bois, Franc, 29. 10. (Artikolo.)

L'impartial, Aulnay, 30. 10. (Artikolo.)

Bote vom Niederrhein, Emmerich Germ., 18. 11. (Nota.)

Recklinghäuser Zeitung, Recklinghausen, Germ., 21. 11. (Nota.)

Deutsche Allgemeine Zeitung, Berlin, 11. 11. (Artikolo.)

Dreadner Nachrichten, Dresden, 25. 11. (Esperanto oficiale uzata ĉe la polica prezidio en Dresden.)

Vögtl. Anzeiger und Tageblatt, Plauen, Germ., 26. 11. (Nota.)

The Workers' Dreadnought, London, 26. 11. (Esp. kurso, leciono 1.)

Norsk Bokbinder-Tidende (Norvega Librobindista Gazeto), Kristiania, 18. 11. (Artikolo en norvega kaj esp. lingvoj pri Esperanto.) Adreso de la redaktoro: Hans Aas, Bokbinder-forbundet Folkets hus, Kristiania.

Volks-wille, Karlsbad, Ĉeĥ., 25. 11. (Nota.)

Nova Gazeta Kolomyjska, Nova Kolomeo, Galicjo, Pol., 20. 11. (Esp. Angulo kaj artikolo.)

Measezeitung, Reichenberg, Ĉeĥ., 30. 11.

As Ulasg, Budapest, 9. 11. (Nota.)

A Nap, Budapest, 11. 11. (Artikolo.)

senpagajn specimenajn ekzemplerojn, resp. sendi iliajn al adresoj de varbotoj nomitaj al ni.

De 5. decembro la ĉefredaktoro havas specialan esp. sekretarion, tiel ke en la sekvantaj 2-3 semajnoj supozeble ĉiuj niaj korespondantoj havos respondon, kaj ke en la nova jaro ni povos prometi pli rapidan kaj pli zorgan plenumon de ĉiuj korespondantoj, petoj kaj deziroj.

La literatura redaktoro de ET

plendas pri ĝenerale tro malbona kvalito de la senditaj literaturaĵoj (prozaĵoj). La redakcio de ET petas ĉiujn verkemajn samideanojn, sendi manuskriptojn por la literatura fakoj, sed nur nepre bonajn kaj publikindajn. Ni atentigas ankaŭ pri niaj konkursoj por ricevi spritaĵojn kaj anekdotojn el ĉiuj anguloj de la mondo.

Blinduloj.

Esperanto ĉe blinduloj en Brazilo.

Dum monato majo estas malfermita en la blindul-instituto „Benjamin Constant“ en Rio de Janeiro esp. kurso gvidata de blinda profesoro s-o Franci-ko de Almeida Junior. La direktoro de la instituto estas tre favora al Esperanto kaj subskribis la peton senditan al la Ligo de Nacioj.

Por „Esperanta Ligilo“

alvenis jenaj novaj donacoj: 81. Alfred Neupert, Leipzig-M8 5 gmk — 82. Heinrich Rippel, Würzburg 20 gmk. — 83. D-ro O. Huber, Uetendorf, Svisl. 45 gmk. — 84. Kolekto de Rotterdam'a Esp. Klubo Laborista 1000 gmk. — 85. Esp. Soc. Hagen i. W. 72 gmk. — 86. S-ino E. Simon, Magdeburg 5 gmk. — 87. F-ino Toni Simon, Magdeburg 5 gmk. — 88. Heinrich Fahl, Wien 100 kr. aŭstr. — 89. Nederlanda Esp. Komerco-Oficejo, Rotterdam 70 gmk. — 90. Germ. Esp.

Parolejo.

106. Respondo al 103.

La poresperanta rezolucio de la Franca Asocio por la Progreso de la Sciencoj estas voĉdonita dum ĝia jara kongreso okazinta en Rouen de 2-7. aŭg. (Alo.)

107. Rilate al 101.

(Pri Monumento al D-ro Zamenhof.)

Mi opinias, ke kelkaj klarigoj tiurilate estos interesaj por la samideanoj. Mi estas membro kaj fondinto de la varsovia komitato por konstrui la monumenton. Tuj kiam naskiĝis la projekto, ni preskaŭ ĉiuj postulis: ne sur la tombo, sed en videbla loko, sur iu placo. Sed... bedaŭrinde, tro multe postulas s-o M. de l' varsoviaj samideanoj. Ne estas al mi agrable ĉi-loke ĉiil la politikajn ĉi-konstancojn, sed eĉ en tiu, ĉi postulo (ke la urba estraro permesu) estas dume nur utopio. Tial ni devis rezigni je niaj altaj aspiroj kaj kontentiĝi dume perlo pli modesta (kio, cetere, tute koincidas kun la karaktero de nia modeste vivinta kaj modeste mortinta Maistro). Sed, akirante tiun monumenton, ni ankoraŭ ne haltas. Ni daŭrigas la vojon al niaj altaj aspiroj. Kaj ni bone konacias, ke inter utopio kaj realaĵo la diferenco estas nur en la tempo. Tial ni esperu (ne vane ni estas esperantistoj), ke post kiam la monumento (ĉar, vere, tio grandioza ĉi ne lokigos) staros sur la tomboj, ni post penoj kaj klopodoj (kiujn ni kompreneble ne ĉaros) akiron fine la permeson, kaj la mondo povos admiri la genicon de nia Maistro ne sur la hebrea tombo, sed sur la centro de Varsovio (sur la Teatra Placo), sur la centro de la lulilo de Esperanto. Kaj dume — paciencon! (Edvardo Lonkopolski.)

Recenzejo.

(Unuoble ricevitajn librojn, spektitojn ktp. ni ne recencas nek mencias; duoble ricevitajn ni ĉiam mencias en la plej proksima numero. Eventuala recenzo sekvas poste. Se oni deziras recenzi, oni ne rajtas postuli eventualan kontraŭrecenzon. Ni rezervas al ni la rajton, ĉu recenzi aŭ ne ian verkon. Se oni ne deziras recenzi, sed nur mencioni, oni speciale rimarkigu tion. — Kun monataj esp. gazetoj ni interŝanĝas unu ekz. de nia semajna ĵurnalo kontraŭ du de ilia gazeto, resp. du kontraŭ kvar.)

LIBROJ.

LA KATOLIKA MOVADO kaj ĝia organo „Espero Katolika“. Eklezia aprubo. Kun „Imprimatur“. Adreso: Esporo Katolika, Udenhout, Nederlando. Eldonata en oktobro 1921. 15:22 cm. 8 pĝ. kaj kovrilo. — La sama broŝuro la situacion en la katolika esp. movado.

VIDLIBRO DE GIRONA. Verkita de Josep Maria Dalmau kaj eldonita de „Girona Esporo“ okaze de la IX-a Kongreso de Kat. Esp. Fed. 1921. 11 1/2:21 cm. 30 tekstaj kaj 44 anoncaj paĝoj. Kun multaj ilustraĵoj.

LA KANTISTINO. Novelo de Vilhelmo Hauff. El germ. lingvo tradukis Eugen Wüster. Nova Esp. Biblioteko n-o 8. 11:15 cm. 64 pĝ. karton. Prezo 7,50 gmk., por bonvalutaj landoj 11,25 gmk. Eldonejo Friedr. Ellersiek, Berlin S. 39, Wisemannstr. 46.

ESSAI SUR LA DERIVATION COMPAREE DANS LES LANGUES NATURELLES ET ARTIFICIELLES. Par Camille Aymouir, agrégé de l'Université. Paris, Office Central Espérantiste, 81 rue de Clichy. 12 1/2:19 cm. 134 pĝ. broŝ. Prezo 8 fr. 1k.

L'ESPERANTO ET LES ASSOCIATIONS INTERNATIONALES AU CONGRES MONDIAL DE BRUXELLES 1920. Paris, Office Central Espérantiste, 81 rue de Clichy. 11:17 1/2 cm. 88 pĝ. Prezo 2 fr. 1k.

BABILADO DE BONHUMORA ZAMENHOFANO. De J. Sapiro (Jusu) Rekomendita de ELA. 10 1/2:17 cm. 44 pĝ. Kun ilustraĵoj. Prezo 8 pĝ. kaj kovrilo. Havebla ĉe Pila Esp. Servo, Bydgoszcz, Kurdecka 1-4.

ANEKDOTOJ PRI DANTE. Antaŭparolo, elekto kaj traduko el itala, latina kaj germana lingvoj de B. kaj E. Migliorini. 10 1/2:15 cm. 34 pĝ. Havebla por 0,80 lito aŭ franko ĉe presejo de „L'Esperanto“, S. Vito al Tagliamento, Italio.

DR. ZAMENHOF'S SPRACHLICHE OUTACHTEN (Lingvaj Respondoj) in deutscher Bearbeitung mit Ergänzungen und Erläuterungen. De Walter Lippmann, inskribito kaj ekzamena komisarulo ĉe la Saksa Esp. Instituto en Leipzig. 14 1/2:22 cm. 72 pĝ. karton. Eldonejo Ferd. Hirt & Sohn, Esp. Fakoj, Leipzig, Germ. Prezo 10 gmk.

GAZETOJ.

BRAZILIA ESPERANTISTO. Majo-aŭgusto.

GERMANA ESPERANTISTO. Nov.

ESPERANTSKY ZPRAVODAJ. Nov.

LA REVUO ORIENTA. Okt.

Kun raporto pri la VIII-a kongreso de japanaj esperantistoj en Tokio, 14-17. okt.

VEGETARANO. Okt.

Grupo, Reichenberg, Ĉeĥosl. 95 kĉ. — 91. Gust. Münch, Leipzig 10 gmk. — 92. G. van Heek, Hengelo 10 gmk. — 93. B. Gluchowski 2000 pmk. Neermanaj donacoj estas petataj ne sendi la donacan sumon per germ. mk., sed per sia propra valuto.

Hungaraj Humoroj.

La anglajn samideanojn certe interesos, kion oni rakontas pri la trankvileco de la anglaj lordoj. Oni diras, ke ĉi lordo kun sia edzino vespermanĝis en la ĝardeno. Foje venis fu'mo kaj morligis la edzinon. „Joh!“ vokis la lordo al la servanto, „forbalau la polvon de la sinjorina moŝio!“

●

Kamparullino eniris fervendejon kaj petis „ĉian kuprokranon, el kiu, se oni ĝin enbato en la muron, fluos akvo“.

●

Juĝisto: Kiam vi aŭdis la vekon?

Atestanto (ruza kamparano): Nokte.

Juĝisto: Bone, sed je kiu horo?

Atestanto: Je kokokrio.

Juĝisto: Sed kiam kriis ĉe vi la koko?

Atestanto: Kiam plaĉas al ili!

●

Patro kaj filo Karlo sidas en fervola kupeo. Karlo ĉiam ekiliniĝas el la fenestro, vane la patro admonas lin, ke li gardu sian novan pajloĉapelon. Foje la patro subite forprenis la ĉapelon kaj kaŝis ĝin. Karlo terurege ekploris. „Ne ploru!“ diris la patro, „mi fajfos, kaj la ĉapelo revenos.“ Kaj tiel okazis. Karlo jam ne ploris, li feliĉe ridetis. Foje li subite ekprenis la ĉapelon kaj jetis ĝin el la vagono tra la fenestro, dirante: „Patro, fajfu ankoraŭfoje!“

Tradukis: Jozefo Major, Budapeŝt.

Internacia Esp. Servo.

(En la intereso de la esp. propagando estas dezirinde, la artikolojn sub tiu ĉi rubriko traduki kaj represi en naciaj ĵurnaloj, eldonante la vortojn „Internacia Esperanto-Servo“ kaj sendante 1-2 ekzemplerojn de la koncerna ĵurnalo la redakcio de ET.)

LETERO EL PALESTINA.

(Rim. de Red.: Tradukontoj de tiu ĉi letero por naciaj ĵurnaloj bonvolu laŭbezzone aligi la komencon.)

Haifa, 6. nov. 1921.

Antaŭ ĉio tulkoran gratulon pro la grava pligrandigo, plibonigo kaj plibeligo de ET! Ĉiam antaŭen! Volontege mi sendis grandan liston da novaj abonantoj, sed Palestina estas unu el la plej malfavoraj landoj al esperantismo. Preskaŭ ĉiuj enloĝantoj parolas arabe aŭ ĝin komprenas. Ankaŭ ĉiuj najbaraj landoj: Sirio ĝis Mezopotamio kaj Arabio, Egipta ĝis Maroka lando okcidenten kaj Zanzibaro suden, parolas arabe. Tial ili malmulte sentas la necescon de alia lingvo.

Krom tio la plimulto de la enloĝantoj ne havas nek komprenas idealojn. Ili celas nur tujan materialan profiton, celas monon kaj gajnon sen elspezi monon. Sed por lerni Esperanton oni devas elspezi almenaŭ loman.

Multaj la penas kaj elspezas sufiĉe por lerni anglan, francan, germanan lingvojn; sed ili esperas tujan rekompencan kiel estontaj oficistoj, komercistoj, interpretistoj ktp.

Aliflanke la judoj, ĉu enlandanoj ĉu enmigrintoj, nur interesiĝas pri propagando de la moderna hebrea lingvo. La multinombraj eŭropaj kolonistoj klopodas pasie propagandi sian nacian lingvon, precipe anglan, francan aŭ italan.

Tial Palestina, unulingva antaŭ la mondmilito, estiĝis oficiale trilingva per la milito, kiel montras niaj poŝtmarkoj kaj oficialaj publikajoj; antaŭ la milito pacema, ĝi fariĝis malpaca poŝte.

4000

devos fariĝi la minimuma regula eldonnombro de ET en la daŭro de tiu ĉi vintro, 3000 la minimuma nombro de la pagantaj legantoj. En la venontaj semajnoj ni povos aranĝi, dank' al grandanima subteno de nederlanda amiko de nia entrepreno, tre vastan propagandon por ET. Ni estas ankaŭ volonte pretaj liveri al samideanoj, kiuj volas varbi abonantojn inter siaj ĝekonatoj,

P. E. S.

Abonejoj de ET

en la landoj

Belga: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen.
Bulgara: Georgi Rr. Gaševski, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.
Ĉeĥoslovaka: Otto Stenčka, Hradec Kralovė.
Estonia: Est. Esp. Unuiĝo, postkasto 6, Tallinn.
Finna: O.Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinki.
Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.
(Abonprezo: 0,45 fl. X nombro da dezirataj sinsekvaj numeroj.)
Hispana: Konrado Doménech, Girona, Rambla Alvarez 12-2.
Hungara: Pablo Balkanyi, Hajos-utca 15 II-2, Budapest VI.
Litova: Paulio v. Medem, Smellu g-ve 12, Kaunas (Kovno).
Pola: Adolfo Oberroman, Krak-Przedm. 10, Warszawa.
(P. K. O. n-o 5125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel),
Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.
Rumana: Esperanto Centro, Targul-Mureş.
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.
U.S.A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth
Avenue, New York City.

Hungara Ĝenerala Kreditbanko Budapest

La plej granda hungara banko kun inter-
rilatoj en ĉiuj landoj.

Akcia kapitalo kaj rezervofondoj: hung.
kr. 900 000 000.

Kvin filioj en Budapest.

Filioj en: Brasso, Debreczen, Fiume, Győr,
Kassa, Kecskemet, Nagyvarad, Pecs, Poz-
sony, Satoraljaújhely, Szabadka, Temesvár.

Prizorgas ankaŭ ĉiujn banknegocojn por
Slovakio kaj Transilvanio per siaj tieaj
filioj. Per ĝiaj entreprenoj eksporto kaj
importo de diversaj artikloj!

Foltoj kaj gravaj Firmoj

estas petataj sendi siajn esp. ĉirkulerojn al ĉi-subaj
firmoj, kiuj plejparte fariĝis donacantoj de loka
esp. klubo:

Firma F. Hazemeyer, Haaksbergerstraat
Heemaf, Bornsche Straat

W. J. van Wulffen Palthe, Julianalaan,
Tulindorp

C. F. Stork, Gründel

A. P. A. Ottignon, C. T. Storkstraat, Tuin-
dorp

R. A. de Monchy, Huize „Huttenbelt“

A. M. Dijkers, Huize „de Belder“

A. H. M. Wesselink, Enschedescheweg 42

Hengelö (O
Nederlando.

Korespondantoj! Atentu!

Ĉiu el vi havas, kiel mi scias laŭ propra sperto,
la deziron, posedi fotografarojn de sia korespond-
anto aŭ -ino. Sed la kutimaj fotoj estas hodiaŭ
tro multekostaj por tiu ĉi celo. Mi povos al vi
liveri por tiu ĉi interŝanĝo tre malmultkostajn
belajn vizitkartojn kun via fotografaĵo.

Prezo por 100 kartoj kun bildo kaj nomo 30 mk.,
kun kompleta adreso 35 mk. Formato 95 : 45 mm.
Farataj laŭ ĉiujn fotografaĵoj, kiuj estos resend-
ata sendefekte. Livertempo 2—3 semajnoj. Al-
sendo per rekomendita letero.

Ferna-Versand, Plauen i. Vogtl., Germ.,
Antonstr. 31.

Anoncetoj.


DU MALRIĈAJ MISIOPATROJ eksterlandan forvojaĝontal
elpetas subtenon por la vojaĝkostoj, kiuj sumiĝas 60 000
gmk., kvankam ili uzos la plej malikaran ŝpklason. —
Mondonacolin oni bonvole sendu al a-o M. Mieler, prez.
de Germ. Ligo de Katolikaj Esperantistoj, Breslau X,
Werderstr. 55.

SENPERA VENDADO de fabrikanto al uzanto ŝparigas al
vi 1/2 de la prezo de aĉetataj objektoj. Ĉu vi deziras
seki la parizan modon? Se jes, aĉetu belartajn kaj
originalajn esperantajn insignojn. Sinjorol, mendu ru-
bandan pendanton por poŝtbrilo kun verda stelo el
galalito, la rando emalita. Sinjorinoj, mendu juvelpen-
danton kun rubando aŭ perloj (laŭ elekto) kaj verda stelo
el galalito. Prezo por ĉiu dek frankoj en rekomendita
sendaĵo. La nemunita pendaĵo kvin frankoj. Grandecol:
0025 kaj 0040. La firmo vendas egale ĉiujn parizajn
artiklojn de propra arta kreado. Detalaĵ klarigoj kontraŭ
respond-kuponon. Ĉiuj mendoj estas akurate prizorgataj.
Stribu al: Atelier Esperanto (direktorino fraŭlino Gérard,
vic-del. de UEA), 9, rue d'Armaille, Paris 17.

BREMEN. Atentu! Mi scias al la delegitoj ktp., ke mi
transloĝita al Berlin S.O. 16, Neanderstr. 20, II lks. Se
mi ne respondas leteron, demandon ktp., bonvolu pardoni.
Nuntempe en Berlin mi prizorgas ĉiujn rilatojn. — Fritz
Bohlmann, del. UEA.

DIAPOSITIVOJ POR LUMBILDOJ de la XIII-a Kongreso,
en sep diversaj aspektoj jam montritaj, por 180 kĉ inkl.
poŝtelapezoj: poste serio de la fotoj el la XIII-a: Mal-
ferma kunsido 12 kĉ., fremduloj 12 kĉ., 2 Karlus Tyn po
7 kĉ., granda grupo 12 kĉ. kaj kelkaj en poŝtkarta for-
mato po 5 kĉ. Riceveblaj ĉe J. B. Vlach, Praha II, poŝt-
fako 504.

ELDONANTOJ KAJ LIBROVENDANTOJ baldaŭ aperos „La
plena lernolibro por ruŝoj — kun gramatiko kaj du (esp-
rusa kaj rusa-esp.) vortaroj“. Publikigis viajn eldonojn
kaj firmojn en tiu grava kaj multe disvastigita libro.
Volu la specialan tarifon peti de P. Hiltrow, Berlin-
Charlottenburg, Goethestr. 15, Germanio.



aus „Architectus-Kasten“

Pedagogie valora novaĵo por geknaboj estas niaj

„ARCHITECTUS“

Ludiloj por kunmeti kaj konstrui.

Facile kompreneblaj, distraj kaj instruaj.

Niaj malaltaj prezoj prezentas grandan profitblon.

Freiburger

Spielwarenfabrik (Ludilfabriko)


Freiburg i. Br.

G. m. b. H.

(Germanio.)

Eksporto ĉiulanden.

Kapablaj reprezentantoj serĉataj.



LEIPZIG-A SPECIMENFOIRO FOIRO

Printempa Foiro 1922 de la 5-a ĝis 11-a de marto

Aŭtuna Foiro 1922 de la 2-a de aŭgusto ĝis 2-a de septembro

La centra merkato por la internacia
komerco kaj ofertado

Same grava por eksportantoj kaj por aĉetantoj

Informoj donas kaj aligajn akceptas

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN
IN LEIPZIG

(Fotografioj por la Specimenfoiroj en Leipzig)

JOHANNESEN-TECHNISCHE HOLO-LEIPZIG

Romualdo Colivicchi

Skulptisto

VOLTERRA, TOSCANA, ITALIO.

Premiita laborejo por skulptaĵoj en

Castellina Marmora

(Alabaŝtro).

Specialaĵoj:

Polikromataj artist-laboraĵoj, lampoj, vazoj, objektoj
por elektra iluminado.

Ĉiuspecaj artist-laboraĵoj estas ĉiam preparataj.
Oni deziras agentojn kaj reprezentantojn en ĉiuj
landoj.

Oni korespondas en Esperanto.

AMUZIGAJ NOVAĴOJ Kiu povas min informi pri bon-
prosperantaj amuzigaj novaĵoj aŭ pri iaj projektoj aŭ
elirovoj, kiuj taŭgas por amuza entrepreno. Proponojn
kun kondiĉoj bonvolu adresi al: Jan B. Vlach, Praha II,
poŝtfako 504.

LA REVUO, Hachette. S-o van Tinteren, Amsterdam, 34
Saxen-Weimarlaan, deziras aĉeti malnovajn jarkolektojn
kaj petas proponojn.
ALFABETUMOJN naŭajn, eĉ uzitajn, deziras ricevi H.
Janverk, Vazalemo, Estonio. Same la stenografistemon
de Jirotofski (rusa) kaj „Paragon“ (angla-amerika).

ANONCOJN por estontaj gazetoj kaj ĵurnaloj, disvastigadon
de presajloj kaj ofertoj en Rusio prizorgas Esperanto-
oficejo Tallinn-Vazalemo, Estonio. Almetu resp.-kup.

ESP. EKSPOZICIO. Fritz Michalek, Reichenberg, Lerchen-
feldstr. 20, Ĉeĥoslovakio. kolektas kaj interŝanĝas por
konstanta esp. ekspozicio ĉiuspecajn esperantajn, propa-
gandilojn ktp.

ESPERANTIO, nova ilustrita gazeto por socia vivo, litera-
turo, arto, humoro, filatelio ktp. serĉas kunlaborantojn
el ĉiuj n-ĉioj. Sendu ĉion al P. Hiltrow, Berlin Charlotten-
burg, Goethestr. 15, Germanio.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o Angelo Chisté, Lasino, Trentino, Italio, deziras inter-
ŝanĝi poŝtkartojn kaj leterojn kun ĉiuj landoj. Li kore-
spondas volonte esperante, itale, germane kaj france.
F-ino Cralina Montaner, Danús 11, Palma de Mallorca,
Hispanio, interŝanĝas ilustritajn gazetojn, poŝtkartojn kaj
poŝtmarkojn, korespondas esperante, france, angle kaj
hispane.

Pal Dinda, II, Telekhaz 5, Temesvár, Rumanio, interŝanĝas
poŝtmarkojn kun la tuta mondo.

Lernantinoj de 3-a gimnazia klaso deziras korespondadi
per ilustr. poŝtkartoj kun junaj fraŭlinoj de ĉiuj landoj,
precipe kun samaĝal lernantinoj. La dezirantoj scigu
sian adreson al la lektoro P. A. Kolev, Regentska 19,
Sofia, Bulgario. — Klarigo: 3-a gimnazia klaso estas
laŭvice la 10-a jaro de studado en lernejoj.

Eksportado Importado

Reprezentanto de
eksterlandaj
firmoj

C. BOOT, ROTTERDAMO
Hollando Graaf Florisstrato 22 Hollando

Petas
korespondi

Bankrilato:
Nederlandsche Handel My.
Rotterdam.

Vendo kaj Interŝanĝo.

S-o Adalberto Radó, Lučenec, Slovakio, vendas
200 belegajn poŝtmarkojn por 1 nederlanda paper-
guldeno, 1 1/2 sved. krono, 2 danaj aŭ norvegaj
kronoj. Sendu rekomendite! Mi ne sendas unue.
Ankaŭ interŝanĝo.

Kiam troviĝos sufiĉaj abonantoj, aperos malgranda
revuo

La Mondo Politika.

Jara abonkosto 3/6 ŝll., t. e. 14 resp.-kup. Ne sendu
monon ĉiuj. sed anoncu vin kiel abonanto.
Oni invitas artikolojn nepagotajn Bonvolu en-
meti kuponon, se neceso respondo.

Redaktoro,

4 Princeton St., London W. C. 1.

Dezirante starigi ĉe mi en Katalun-
ujo (francilia hispana regiono)
:: :: :: oficejon de :: :: ::

Reprezentoj per Esperanto

mi petas al ĉiuj firmoj kaj komerc-
istaj esp. grupoj, bonvole trans-
doni al mi siajn reprezentojn,
sendante katalogojn, prezarojn kaj
— se eble — specimenojn de novaĵ
:: facile vendeblaj komercaĵoj. ::
Adresu: Konrado Doménech,
Rambla Alvarez 12, 2-a etaĝo,
:: Girona, Hispanlando. :: ::
Nur korespondado en Esperanto.

S-o instruisto J. Wünsch, Karlebad, Ĉeĥosl., Brückenstr.,
serĉas gekorespondantojn ĉiulandajn por siaj gekursanoj
pleneĝal per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.

S-o Frant. Balíček, Instruisto, Červený Kostelec, Ĉeĥosl.,
interŝanĝas poŝtkartojn, leterojn, poŝtmarkojn, monojn
kaj lernantulaĵajn desegnaĵojn precipe kun eksterŝtataj
instruistoj.

S-o Ladislao Spiro, Miskolcz, Reményi utca 7, Hungario,
deziras serioze interkorespondi kun planludantoj kaj
komponist-studentoj de l'Académie Nationale de Musique,
Paris, franclingve, ankaŭ kun perfektuloj, pri muziko,
belartoj per leteroj, poŝtkartoj ilustr. esperante.

F-ino Rozsi Auerbach, Miskolcz, Szeles utca 1, Hungario,
deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. (bfl.) kun ĉiulandaj
gesamideanoj.

S-o Alfred Klein, Miskolcz, Dayka Gabor utca 1, Hungario,
deziras korespondi kun seriozaj samideanoj kaj iuristoj.
Interŝanĝas ankaŭ poŝtmarkojn.

S-o Marcell Lichner, Miskolcz, Szemere utca 29, Hungario,
deziras korespondi per leteroj, poŝtkartoj ilustr. (bfl.)
kun ĉiulandaj gesamideanoj.

S-o Jenő Rosenthal, Miskolcz, Scéchenyi utca 103, Hungario,
deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bfl.) kun ĉiulandaj
gesamideanoj kaj studentoj.

Kiu deziras korespondi kun samideanoj el Chojnice, skribu
al s-o K. Majorkiewicz, Instr., Chojnice, Pol., Pl. Krol.
Jadwigi 2.

S-o Manuel Noelle Güell, General Arenales F. O. P., Argent.,
Sudameriko, deziras interkorespondadi kun gesamideanoj
ĉiulandaj per leteroj aŭ poŝtkartoj ilustr., pri iaj temoj,
precipe pri socialista movado; ankaŭ interŝanĝas poŝt-
markojn, gazetojn, revuojn, librojn esperantajn ktp.

F-ino Muratovskaja, Siberio, Omak, str. Počtavalja 21,
deziras interkorespondi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj
kun ĉiuj landoj.

S-o V. Pimenov, Staropavlovskoe, Tersk. obl., Rusl., deziras
por siaj 15 kursanoj ĝejunuloj (kozakidoj) havi korespond-
antojn en ĉiuj landoj, por interŝanĝi poŝtkartojn ilustr.,
leterojn, poŝtmarkojn ktp.



GEBR. KROSS

INTERNACIA EKSPEDADO • TENADO
DOGANADO • ENKASIGADO kaj ASEKURADO

Telefono 62 Libau (Latvio) Tel. Adr.: Kross
Riga, Gr. Kūlturst. 14 Windau, Marktstr. 3

Reprezentantoj de la firmo

KARL LASSEN

en Stettin, Hamburg, Lübeck, Danzig, Bremen, Emden, Berlin,
Leipzig, Frankfurt a. M., Dresden, Chemnitz, Köln, Mann-
heim, Stuttgart, Karlsruhe, Offenburg, Schramberg,
Prostken, Nürnberg, Pforzheim, Salzburg, Regensburg,
Schwenningen, Schw. Gmünd, Freiburg i. Br., Bodenbach,
Tetschen, Wien I.
Stockholm, Göteborg.
Kopenhago, Esbjerg.
Rotterdam, Kristiania, Lisbona, Tallinn-Reval.



En Decembro aperos n-o 12 de

LITERATURO

Kvaronjara Literatura Gazeto Esperanta.

En tiu numero aperos, inter aliaj interesajoj:
1. Traduko de La Forpaso de Arturo, el la
verkoj de la fama angla poeto Tennyson. La
traduko estas farita de f-ino L. Briggs, kiu per
ĝi gajnis oran medalon de la Brita Literatura kaj
Debata Societo.

2. Artikolo pri Infana Esperanto, de a-o M.
C. Butler, kun multaj interesaj ekzemploj de infana
parolado.

Kun ĉiu ekzemplero de la gazeto estos donaca-
ta bela portreto de la infanoj priparolataj.

Ne estas necese atendi por aboni. Tion vi
povas fari tuj, kaj tiuokaze vi ricevos ankaŭ n-on
11 (per kiu via abono komenciĝos).

Abonprezoj por la sekvantaj landoj nun estas
(por kvar kvaronjaraj numeroj):

Belgujo 4 frankoj
Danujo 2.50 kronoj
Egiptujo 12 plastroj
Francujo 4 frankoj
Grekujo 5 drakmoj
Hispanujo 3.50 pesetoj
Japanujo 1 jeno

Kanado 50 cendoj
Meksikio 1 dolaro
Nederlanda 1.50 fiorenoj
Norvegujo 2.50 kronoj
Svedujo 2.50 kronoj
Svisujo 3 frankoj
Usono 50 cendoj

Abonantoj en aliaj landoj devas sendi 2 ŝilingojn
kaj 6 pencejn en angla mono aŭ 12 resp.-kup.

Charles H. Edmonds, Wembley, Angl.,

Administranto,

„Rockwood“, High Road.

Grandkomercejo de Bildokadroj

Otto Knittel & Cie., Freiburg i. Br.

(Germanio)

Wenzingerstr. 42.



Importo.

Eksporto.

Plej bona aĉetejo por orumitaj kaj polur-
itaj bildokadroj.

Eksporto ĉiulanden. — Oni petu speci-
menojn kaj prezojn.

Reprezentantoj serĉataj.

Vjačeslav Vasiljevič Kalašnikov, Rus., urbo Niŝnij-Novgorod
Gruzinskij per. 6, kv. 6, deziras korespondadi kun la
tuta mondo pri esp. movado, interŝanĝas ilustr. poŝt-
kartojn kun vidaĵoj de urboj kaj kolektas ĉion en kaj
pri Esp.

Deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj la ĝelernantoj de
la esp. lernejo en Auerbach i. V., Germ. Ankaŭ inter-
ŝanĝas poŝtmarkojn, gazetojn ktp. Adresu: Esperanto,
Auerbach, Vogllando, Germ.

S-o Walter Urban, Ingeniero, Glaschütte-Sa., Germ., deziras
korespondadi per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun sam-
ideanoj en ĉiuj landoj.

S-o E. Friebe, Instruisto, del. de UEA, Residenzstr. 24,
Dresden-Ĥobritz, Germanlando, serĉas tutmondajn geko-
respondemulojn per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj leteroj
pri ĉiu temo, prefere pedagogia; donas komercajn informojn

S-o Hermann Schmidt, Unteraltenburg 10, Merseburg a. S.,
Germ., deziras korespondadi precipe nur kun fraŭlinoj
pri iaj tre interesantaj temoj.

S-o Oswald Wittig, Klausentor 3, Merseburg a. S., Germ.,
deziras korespondi, precipe kun fraŭlinoj, pri iaj interesaj
temoj.

D-ro Plagge en Kötischenbroda (Germ.) deziras korespondi
per leteroj kaj ilustritaj poŝtkartoj kun eksterlandanoj
pri karakterizaj naciaj vidindaĵoj, kutimoj, moroj, vojaĝoj;
li ankaŭ interŝanĝas poŝtmarkojn.

S-o Friedrich Hahn, Bremen, Germ., Riensbergerstr. 22,
deziras korespondi per poŝtkartoj kaj leteroj; ankaŭ
interŝanĝi libretojn nacilingvajn kun ĉiuj landoj.

S-o F. X. Hofmann, librotlenisto, München, Germ., Karl
Singer Str. 10, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj ilustr.
poŝtkartojn (bfl.) kun eksterlandanoj.

Por la infan-instruado en Mainz mi serĉas gekorespond-
antojn. P. Becker, Mainz, Germ., Holzstr. 10.

S-o Eduard Volkmann, Düsseldorf, Germ., Uerdingerstr. 77,
deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Willy Puls, Gelsenkirchen, Grenzstr. 116, Germ., deziras
korespondi kun ĉiuj landoj.